

LA VEKHORLOGO SONORAS.

di Maria Chiesa

Trad. di Laura Nones

Sceno.

Malgranda simple meblita vivoĉambro. Dekstre, la pordo de la kuirejo; maldekstre, tiu de la dormoĉambro; ĉe la fono, la elirpordo. Je la kurtenleviĝo, la patrino estas pretiganta la matenmanĝon, enirante la kuirejon kaj elirante el ĝi; la avino sidas en fotelo. Ĉe la vando estas kroĉita horloĝo; sur meblo staras granda vekhorloĝo.

Persoĝoj

Mirella;  
Patrino;  
Patro ;  
Avino.

Avino: Ĉu la kafo estas preta?

Patrino: Jen la kafo.

A: Ĉu vi enmetis la sukeron?

P: Kompreneble.

A: Ĉu vi miksis per la kulereto?

P: Jes, mi tion faris.

A: Ĉu ĝi estas varmega?

P: Avino, ĉu vi volas, ke mi trinku ĝin anstataŭ vi?

A: Klaĉulino, ne estu impertinenta!

P: Ĉiumatene la sama muziko!

A: Ankaŭ vi iam maljuniĝos. Oni vidos, ĉu vi estas perfekta. (sonoregas la vekhorloĝo) Jen la dua veko. Kiom da dormemo ĉi-matene! La tago ŝajnas eĉ pli malhela ol kutime.

P: Jen. Mi volas vidi, ĉu Mirella aŭdis la vekon.

A: Kompreneble ŝi aŭdis ĝin, sed komedias. Kompatinda! Ŝi ŝatas kuŝi en la lito.

P: (indigne) Vidu, vidu! Do kiu iros al la lernejo? Ĉu ni du?

A: (ridante) Ha, Ha; mi nepre ne. Voku ŝin, aŭ ŝi malfruos.

P: (kriegante) Mirella, ellitiĝu, estas malfrue. (neniu respondo)

A: Vi devas eniri la ĉambron!

P: (tiam farante) Mirella, tuj ellitiĝu!

A: Ĉiumatene la samo! Nun la knabino ekvekiĝas, poste refermas la okulojn kaj denove endormiĝas aŭ tion ŝajnigas. Kaj mia kompatinda bofilino eniras kaj eliras tri-aŭ kvarfoje, ĝis kiam estas necese energie elpreni ŝin el la lito.

P: Kion vi estas diranta, avino?

A: Nenion. Ĉu ŝi ellitiĝis?

P: Tio estus! (Ŝi ridas) Ĝis kiam mi ne elŝiras ŝin el la lito....

A: Vespere ŝi tro longe sidas antaŭ la televidilo. Oni devas enlitiĝi pli frue, por vekigi ĝustatempe por la lernejo.

P: Eble tio veras. Sed kulpa ŝi patro, kiu neniam cedas.

A: Kion vi volas diri?

P: Li devus doni bonan ekzemplon, elŝalti la televidilon, kaj iri dormi.

A: Sed ne, kompatinda viro. Post tuta labortago, li ja rajtas...

P: (kriante) Mirella, Mirella!

A: (kun ekskuiĝo) Mia Dio, kia teruro! Kion vi faras?

P: Mi vokas (Ŝi iras al la pordo) Mirella!

A: Nu, tiom da kriado ĉiumatene ege min tedas.

P: Sed kion fari? (rigardante la vekhorloĝon) Nun mi devas eniri kaj preni ŝin. (Enirinte la ĉambron, ŝi eliras kun Mirella, kiu ankoraŭ estas dormema) Rapidu! Necesas rapidi!

Mirella: (oscedante) Mi ne iras al la lernejo.

P: Kial, mia kara? Oni devas iri al la lernejo; ĉiuj diligentaj knabinetoj tien iras. (Ŝi komencas depreni de la filino la piĝamjaketon)

M: Al mi estas malvarme. Mi havas febron. Rigardu kiel mi tremas.

A: Kompatinda trezoro! Ŝi estas certe malsana. Taksu al ŝi la temperaturon. (opp. taksu ŝian temperaturon.)

P: (Deprenante al ŝi la pantalonon de la piĝamo) Ni ne havas tempon, ĉar ni alvenos malfrue. Rapidu, Mirella, ekvekiĝu!

A: Kia rezonado! Se ŝi malsanas ....

P: Je nenio ŝi suferas. Rapidu! (Metante sur ŝian frunton plastron) Jen. Tiu ĉi plastro malkaŝas la febron, se ĝi estas. Dume trinku la lakton (metante ĝin antaŭ ŝin) kaj manĝu la panon, kiu faras sangon.

M: Mi ĝin ne volas. Ĝi estas hieraŭa.

P: Ĝi estas freŝa. Rigardu. Mi ĵus iris ĝin aĉeti. (palpebrumante al la avino) Ĉu ne, avinjo?

A: Tute certe, manĝu... Sed vi espereble ne lasos la knabine-ton tiom da tempo nur kun la kalsoneto.

P: Manĝu. Rapidu, poste lavu kaj vestu vin!

A: Iam, kiam mi estis juna, oni devis antaŭe sin lavi, preĝi kaj nur poste oni sidiĝis ĉe tablo.

P: La tempoj ŝanĝiĝas. (kriante) Manĝu!

M: Ne. Mi vidis: vi palpebrumis al la avino. La pano venas el la fridujo, mi ĝin ne volas.

P: Do, almenaŭ trinku.

M: (Trinkinte kontraŭvole) Jen.

P: Trinku ĉion, kio estas en la taso.

M: Mi ne emas. Mi ŝatus panon kun kolbaso;

P: Kuraĝe! Mi aĉetos por vi brioĉon dumvoje. Avinjo, kioma horo estas?

A: La nuna hieraŭa horo, nek pli malfrue, nek pli frue.

P: Sed ĉesu ŝerci per ĉi tiuj malnovaj diraĵoj!

A: Tie estas la horloĝo. Rigardu!

Vi havas ankoraŭ iom da tempo: dek minutojn. Sed ŝi devas sin lavi.

P: Tute certe. (Rigardante la plastron): Febron ŝi ne havas. (Ŝi elŝiras la plastron).

M: Ha!

P: (Prenante ŝin je la mano). Rapidu al la banejo. (Ili eliras: akvobruo, krioj k.t.p.)

A: Kia muziko ĉiumatene! Neniu rimedo estas. Mia filo ne deĵoras matene; tiel li dormas kaj la filino volas lin imiti. Sed oni devus klarigi al ŝi la aferon pacience. (Rigardante la vektorloĝon): Ĉi-matene estas pli malfrue ol kutime... (ridante): sed ne. Mi faris ŝercon. Mi antaŭenpuŝis la montrilojn de la du vektorloĝoj kaj eĉ de la horloĝo je unu horo.

P: (interne) Rapidu, alie mi vin batas.

A: Kia maniero! Tiaj esprimoj tute ne plaĉas al mi.

P: kaj M. : (ili venas kurante, jam pretaj por eliri. La patrino estas nervoza)

P: Ni iru! Sed oni ne povas vivi tiel. Ĉiutage, ĉiumatene! Mi metos ŝin en kolegion! (Ili eliras, batante la pardonon.)

A: (ridante) Ha, ha! Kia paco! Kaj nun? Kio okazos? Ili eliris je unu horo pli frue. (Ŝi stariĝas kaj etendas la membrojn) Verdire mi ankoraŭ emas dormi, ĉar, ŝajnas nekredeble, kutime mi vekigis frue, sed ĉi-foje, ĝuste kiam mi volis doni lecionon al ambaŭ... Dume mi trinkos alian kafon. Ĉiuj senĉese gardas min tie ĉi, ĉar, laŭ ili, la kafo difektas la sanon. Sed mia bofilino ne povas tuj reveni, ĉar antaŭ ol oni malfermos la lernejon, ĉi-matene... (Ridante laŭte la avino versas al si taseton da kafo) Jen, mi aldonas ankaŭ iomete da alkoholaĵo (Ŝi prenas la botelon el la vitrineto) Kial mi neniam povas fari tion, kion mi volas? (Paŭzo) Sed nun, bonŝance mi ekmemoras tion, mi devas reguligi la horloĝojn (Ŝi plenumas tion) Jen... Mi devas ŝajnigi min indiferenta. Tamen mi ekhavas dubojn. Ĉu io okazos? Pli bone ne pripensi tion. Dume mi pretigas min por iri al la meso, kaj poste al la kuracisto por ke li taksu mian sangopremon. (Ridante) Ĉi-matene li certe trovos ĝin alta, ĉar mi trinkis du kafojn. Jen. Mi iras preni la mansaketon..., reguligas la vektorloĝon... surmetas la ŝuojn... kaj jen, mi estas jam preta. (Ŝi iras kaj reeniras, poste rigardas ĉirkaŭen) Mi estas en ordo.

(Paŭzo - muziko je malplena scenejo; eniras la evidente kolera patrino)

P: (rigardante ĉirkaŭen) Kie ŝi estas? Ha, ŝi elŝteliĝis. Kaj kio pri la horloĝoj? (Ŝi rigardas la horloĝon, eniras la ĉambron kaj eliras kun la vektorloĝo, ĝin komparaŝ kun tiu de la manĝoĉambro) Ĉio en ordo. Ha, estas ruza la avino! Ĉi-foje ŝi faris al ni ŝercon. (Paŭzo) Mi ne scias, ĉu koleriĝi aŭ ridi. Vere, tuj kiam mi eliris, mi rimarkis ion strangan; kiel diri? Ĉio ŝajnis kiel ĉiam, sed surstrate estis malmultaj homoj, kaj ne la kutimaj. Mi ne renkontis sinjoron Amedeo(n) kun lia hundeto, kiel ĉiumatene;

mi ne vidis la kutimajn virinetojn, kiuj iras al la meso je la oka. Mi ekrigardis la turhorloĝon, sed nenion rimarkis. Ĉe la bako kejo mi eĉ koleriĝis. "Kial ankoraŭ ne estas la brioĉoj?" "Ili estas alvenontaj". "Ni malfruas!". "Ĉu vi faros ekskurson?" "Sed kian ekskurson! Tio estus!" "Jen la novbakitaj varmaj brioĉoj." Alvenis fakte baldaŭ per triciklo la komizo. La knabineto volis du brioĉojn kaj tuj manĝis unu el ili. Verdire unu manĝis ankaŭ mi, kaj poste, kure al la lernejo. (Paŭzo) Ĉio fermiĝis. Neniu ĉeestis. Kion fari? Haltis aŭtomobilo el kiu eliris du knabinoj kun sia patro. Li sonorigis ĉe la pordo; malfermis la pedelo dirante: "Lernu silente kaj senmove en la klasĉambro, mi petas." Ne sciante, kion pripensi, mi antaŭenpuŝis ankaŭ Mirella(n). "Panjo" ŝi diris iom timeme. "Iru, kaj zorgu mem pri vi" respondis mi. "Tiel vi lernos, kio okazas, kiam oni ellitiĝas tro frue". Poste mi forkuris. Sed dum la reveno, mi ekhavis dubon. "Pardonu, kioma horo estas?" mi demandis pasanton. "Estas la sepa kaj kvin minutoj". Kio? Tiam mi ĉion komprenis. Kaj nun, kion fari? Mi alvokos mian edzon. (laŭte) Jozefo!

J: (interne) Diru al mi, Karla.

P: Eliru el la ĉambro. Mi devas diri ion al vi.

J: (interne) Post paro da horoj. Lasu min dormi.

P: Nenio. Li ne ellitiĝas. (Irante tien kaj tien) kaj nun, kion mi faru? Estas frue, mi povos promeni kaj... (ridante) mi volas redoni la ŝercon al la avino. (Ŝi antaŭenpuŝas la montrilojn ĝis la 11-a kaj la samon faras ĉe la vekhorloĝo.) Jen. Kutime ŝi revenas je la 10-a, kaj ĉi -matene nur pene ŝi restos ekstere unu horon pli ol kutime. Kiam ŝi revenos... eĉ mi antaŭenpuŝos la montrilojn je alia horo. (Ŝi plenumas). Jen. Mi faras miajn kalkulojn kaj... (ŝi antaŭenpuŝas ankaŭ la horon sur la vekhorloĝo). Sufiĉos se mi revenos post du horoj, ĉar ..... mi timas konfuziĝi.... jes, nun estas nur la sepa kaj duono, ne la oka kaj duono; la avino revenos je la deka, la vera horo, kaj mi... ne. Mi tute eraris. Oni devas malantaŭenpuŝi la montrilojn... (Plenumante)... ĝis la kvina kaj duono; tiel kiam ŝi revenos, kaj estos ekzakte la deka, la horloĝoj montros, se mi ne eraras, la okan. Mi ne ŝanĝas la horon en la ĉambro, ĉar certe ŝi forgesos. Tiel mi povos fari belan promenadon. Kaj kiam ŝi volos manĝi kaj serĉos sed ne vidos min, ŝi komprenos, ke mi estas pli ruza ol ŝi. (Ŝi eliras).

(Paŭzo - muziko je malplena scenejo - la horloĝoj montras la okan.)

A: (enirante) Kia silento! Neniu ĉeestas. (Rigardante la horloĝon) Ĉu la oka? Sed mi nenion plu komprenas. Estas la deka, mi estas certa.... Kiel laca mi estas! Mi ĉion kontrolis kaj planis. Kien iris Karla? Ĉu ŝi hodiaŭ ne pretigas la tagmanĝon?

Mirella: (ekenirante) Saluton, avinjo.

A: Saluton, kara. Kial tiel frue?

- M: Estas la ... (rigardante la horloĝon) sed tiu horloĝo eraras!  
Nun mi komprenas ke ĉi-matene ... Avinjo, estas magio; la horloĝoj  
marŝas malantaŭen, kiel la kankroj. Rigardu ankaŭ la vekhorloĝo.  
Mi timas!
- A: Stultulineto! Kion vi diras? Kial vi eliris el la lernejo tiel  
frue?
- M: LA geinstruistoj kuniĝas por kunveno. Panjo eĉ ne venis por pre-  
ni min.
- A: Ĉu ŝi ne venis? Ha, mi ne scias, kion pripensi. Jam estas pli ol  
la deka. Alvoku vian patron.
- M: Paĉjo, venu!
- J: (interne) Estas frue. Silentu. Mi devas ankoraŭ dormi.
- M: Avinjo, kion mi faru?
- A: Metu la librojn en ilian lokon kaj poste venu tien ĉi. Mi ra-  
kontos al vi historieton.
- M: (plenuminte, alpreksimiĝas) Diru al mi, avinjo
- A: Iam estis knabineto, kiu neniam volis ellitiĝi matene. Tiel ŝia  
avino volis korekti ŝin, kaj...
- P: (sojle, interrompante ŝin) kaj ŝi alvokis la horloĝfeinon, kiu  
per bato de sia magia vergo, ŝanĝis ĉiujn horojn.
- A: Tiel la knabineto iris pli frue al la lernejo kaj la patrino  
povis promenadi.
- P: Kaj la avino tre ĝojis.
- M: Mi nenion komprenas.
- P: Pli bone. Sufiĉas nur ellitiĝi, kiam la vekhorloĝo sonoras. Pri  
la ceteraj aferoj pensas ni, ĉu ne, avinjo?
-

